

N. N. 32,  
Rozbranĉo forĝermadis

*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauloj jam kantadis:  
de Jiŝaj ĝia spec'.  
Floreton portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet':  
Maria netuŝita,  
de kiu la floret'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

...

N. N. 32,  
Burĝonis rozarbedo

*tradukita de Guido Holz*

1. Burĝonis roz-arbedo  
el delikata sin'  
laŭ olda kant-heredo,  
Jiŝaj la origin';  
ekĝermis ĉarma flor'  
dum frosta vintro-tempo  
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,  
mirinda roz-arbed',  
elvenis flor' benata  
laŭ diro de profet'.  
Laŭ sankta Di-ordon'  
ŝi naskis infaneton  
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,  
amindas per parfum';  
la nokton ĝi forpelas  
per sia brila lum',  
nin helpas el mizer',  
el pek' kaj morto savas;  
Li, hom' kaj Di' en ver'.

...

N. N. 32,  
Jen ĉiamviva Rozo

*tradukita de Leland Bryant  
Ross*

Jen ĉiamviva Rozo  
laŭ vorto de profet'  
El la Jiŝaja ŝoso  
ekkreskis kun impet'.  
Ĝi venis, hela Flor',  
en frida tempo vintra  
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,  
la menciita Flor';  
Maria ĝin responsis  
el patrin-ama kor'.  
Ŝi naskis Rozon por  
klarigi Dian amon  
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro  
per sia dolĉ-arom'  
Heligas per Digloro  
la vojon de la hom'.  
Ja homo, tamen Di',  
ĝi ŝarĝojn malpezigas  
Kaj homojn savas ĝi.

...

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.*

*Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)*

*Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.*

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).*

*Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)*

*Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro “Adoru”, n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).*

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).*

*Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.*